



● **IRLANDO:**

lingvoj, komunumoj
- kaj politiko

● **ĈINIO:**

Monopolo super la
elektropova provizado

Antaŭ 50 jaroj

Moderna kurso

por modernaj homoj
per modernaj metodoj

Aperis ĉe FEL nova „Ampleksa baza Esperanto-kurso”, kompakta disko (kodoromo) por Windows 95/98/ME/2000/XP, kun Esperanto-kurso, vortaro kaj vorttrejnilo kaj kun ampleksaj informoj pri la Esperanto-movado. Akompanas la lecionojn muzikaj fragmentoj, i.a de Kajto, Jomo, Persone... ekzemploj el la Esperanto-literaturo, kompleta numero de MONATO, rabatkuponoj por Esperanto-renkontiĝoj, kaj multe pli.

La kurso ekzistas kun kovrilo kaj klarigoj en la lingvoj nederlanda, franca, germana, angla, hispana, itala, portugala, dana, norvega kaj sveda.

Prezo ĉe FEL: **14,96 EUR** + afranko.
Distribuantoj ricevas rabaton de 33 % aĉetante tri ekzemplerojn aŭ pli samtempe.

Mendu la kurson (ne forgesante indiki la lingvon) ĉe
Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio;
rete: butiko@fel.esperanto.be
<http://retbutiko.esperanto.be>



Poemaro pri la vivo




Poemaro pri feliĉo, pri rememoroj, pri la naturo, multaj eroj kun ekologia inspiro. Fine poemoj pri malpaco, pri poluado, pri komerco kaj konsumado, pri atomenergio kaj Eŭropo ankaŭ apartenas al la penso de Rejna. Poezio tre simpla, jen ritma, jen senritma. Troveblas kelkaj aludoj al aliaj poetoj en ŝiaj poemoj. Rejna de Jong estas persista poetino kun aparta voĉo. Plia virina voĉo gravas, eĉ se voĉeto modesta, minora.

Chris Declerck

Paĝoj: 76; 21 cm; vinktila;
Prezo: **€ 10,00**

Informoj:
tlf. +32 234 34 00;
fak. +32 233 54 33
rete: butiko@fel.esperanto.be
www.retbutiko.net

Furoro de 

Tra infanaj okuloj: memoroj pri la eventoj de '56

9

En 2006 oni festas la duonjarcentan jubileon de la t.n. eventoj de '56. La revolucio de la hungaroj kontraŭ la altrudita komunista-sovetia vid- kaj viv-maniero oni nomas en Hungario simple „kvindek ses”. Tamen dum pli ol 30 jaroj la popolveiĝon oni devis nomi oficiale kontraŭrevolucio aŭ, iom neŭtrale, sed kun malaprobiga akcento, „la eventoj de '56”. Ordinaraj homoj ĉiam diris „revolucio” aŭ, mal- longe, „kvindek ses”.



Lingvoj, komunumoj - kaj politiko

14

Kiel gaelparolanta regiono estas agnoskita en septembro kvartalo en okcidenta Belfasto. Neniuj alia nordirlanda instanco krom la ĉefurba magistrato ĝis nun nomumis regionon tia. Laŭkonstitucie la gaela estas la unua oficiala lingvo de la Respubliko, sed ne de Nord-Irlando.



Monopolo super la elektropova provizado

17

Kvankam en la jaro 2002 la ĉina registaro transformis la monopolon de la Ŝtata Kompanio pri Elektropovo (ŜKEP) al konkurenca grupo kun kvar grandaj kompanioj pri elektropovo kiel la kerno, tamen la transformo ne estigis ajnan pozitivan efikon, kaj la monopolo restas kiel antaŭe.



Laŭ spuroj de „La Tria Viro”

22

Multaj turistoj vizitas Vienon pro ĝiaj muziko kaj teatroj, muzeoj kaj parkoj. Krome ankaŭ viglaj filmamantoj povas veturi al Vieno por ekkoni la lokojn, kiujn reĝisoro Carol Reed uzis por la filmo „The Third Man” (La tria viro, 1949) – vera majstroverko kaj plej granda filmo iam ajn produktita de brita kompanio.



POLITIKO

Niĝerio	8
Venkas la verdikto	
Hungario.....	9
Tra infanaj okuloj: memoroj pri la eventoj de '56	
Albanio	12
La prokuroro kaj la prezidanto	
Balkanio	12
Alvoko al kunlaboro	

MODERNA VIVO

Japanio	13
Frua enlitiĝo, frua ellitiĝo	
Irlando.....	14
Lingvoj, komunumoj - kaj politiko	
Hungario.....	16
Ŝtormo post ŝtormo	

EKONOMIO

Ĉinio	
Monopolo super la elektropova provizado	17
Pezaj enlandaj ŝarĝoj por la registaro.....	18
Litovio.....	20
Salajro en koverta	
D.R. Kongo.....	20
Kongaj bankoj ekhavas malbonan reputacion	
Japanio	21
Prezidanto de la centra japana banko profitis	

TURISMO

Aŭstrio.....	22
Laŭ spuroj de „La Tria Viro”	

LIBROJ

Kronikoj de niaj frustriĝoj.....	24
Memoroj neniam perdas sian malĝojon.....	25

ENIMGO

3 en 1	26
--------------	----

Abonoj	4
Enkonduko	5
Leteroj.....	6
El mia vidpunkto.....	7
Anoncetoj.....	27

Kiel pagi vian abonon de MONATO?

► Rekte al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validadatan fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al rebutitiko@fel.esperanto.be (eblas ĉifri la mesaĝon per PGP/GPG).
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto	MONATO		La Jaro aere		
	surface	aere	1 fojon monate	tuj	
Argentino	EUR	23	26	5	9
Aŭstralio	AUD	82	90	9	17
Aŭstrio	EUR	46	50	5	9
Belgio	EUR	46	56	5	9
Brazilo	EUR	23	26	5	9
Britio	GBP	32	35	4	6.5
Bulgario	EUR	23	26	5	9
Ĉeĥio	EUR	30	34	5	9
Danio	DKK	345	375	40	70
Estonio	EUR	23	26	5	9
Finnlando	EUR	46	50	5	9
Francio	EUR	46	50	5	9
Germanio	EUR	46	50	5	9
Germanio orienta	EUR	41	45	5	9
Grekio	EUR	41	45	5	9
Hispanio	EUR	41	45	5	9
Honkongo	EUR	41	45	5	9
Hungario	EUR	23	26	5	9
Irlando	EUR	46	50	5	9
Islando	EUR	46	50	5	9
Israelo	EUR	41	45	5	9
Italio	EUR	46	50	5	9
Japanio	JPY	6900	7300	860	1260
Kanado	CAD	73	78	9	15
Kipro	EUR	30	34	5	9
Koreio	EUR	41	45	5	9
Kroatio	EUR	23	26	5	9
Latvio	EUR	23	26	5	9
Litovio	EUR	23	26	5	9
Luksemburgo	EUR	46	50	5	9
Malto	EUR	30	34	5	9
Nederlando	EUR	46	50	5	9
Norvegio	NOK	390	430	45	71
Nov-Zelando	NZD	93	99	9	18
Pollando	PLZ	99	110	22	36
Portugaliao	EUR	37	41	5	9
Rusio	EUR	23	26	5	9
Singapuro	EUR	41	45	5	10
Slovakio	EUR	23	26	5	9
Slovenio	EUR	30	34	5	9
Sud-Afriko	EUR	41	46	5	10
Svedio	SEK	430	465	49	84
Svislando	CHF	74	81	9	14
Tajvano	EUR	41	45	5	9
Usono	USD	61	65	8	13
Baza tarifo	EUR	46	50	5	9

Prezo de la retaj versioj (askia, unikoda aŭ PDF): 60% de la surfaca tarifo.

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libroservo@esperanto.org.au.
- **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazilo:** Brazilo Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** David Kelso, 5 Craigenhill Road, Kilncadzow, CARLUKE ML8 4QT, Tel 01555 759 166. Reto: davidekelso@yahoo.co.uk
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnicky@quick.cz.
- **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estono:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofficejo@esperanto.fi
- **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**
 - Hilde Maul, Pferserer Str. 15, D-86150 Augsburg (banko: LIGA Augsburg 113514, BLZ 750 903 00). Reto: s.h.maul@t-online.de.
 - Literatura-Servo "Espero", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schwering (Volksbank Grafschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo.ESPERO@t-online.de.
 - Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Nidenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakats u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosa 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japano:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwolemskatf@shaw.ca.
- **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperant@unitel.co.kr
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr
- **Kroato:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, a.k. 1469, LT-10009 Vilnius-40, Litovio. Reto: laimius@fastlink.lt.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Ruslandaj:**
 - Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalingrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.81 0.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- **Svedaj:**
 - Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Rete: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 - Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Faks: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org



Memore pri Auld

La Esperanto-mondo perdis heroon: meze de septembro mortis William Auld, plej granda poeto de la Lingvo Internacia, korifeo de ĝia literaturo. Ni funebras ne nur pro tio, sed ankaŭ ĉar nia revuo havis lin dekomence kiel amikon kaj redaktoron. Kiam antaŭ 30 jaroj mi preparis la lanĉon de la gazeto *Semajno*, kun granda hezitemo mi kuraĝis demandi la famulon, ĉu eventuale li pretus transpreni la rubrikon pri literaturo, do noveloj kaj poemoj. Je mia surprizo li tuj akceptis kaj preparis tekstojn por la nul-numero. Kiam el mia iniciato poste fariĝis *Monato*, li tenis la funkcion de tiurubrika redaktoro. Li estis milda redaktisto, kiu lasis al poetoj liberecon; gravis por li precipe enhavo kaj verk-arto. Pro sia toleremo li pretervidis fojfoje erarojn, kio embarasis kompostistojn kaj reviziantojn. Sed entute li fidele kaj akurate plenumis sian taskon. Kiam okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto mi proponis, konforme al la karaktero de nia revuo, kolekton de socikritikaj poemoj, entuziasme li tuj aprezis la ideon kaj fervore atakis la temporaban taskon. Rezulto estis la impona antologio *Sub la signo de socia muzo*.

En 1998 en nia revuo aperis kelkaj artikoloj, kiuj kaŭzis skandaletojn; tio ĉagrenis Auld tiom, ke li forlasis sian postenon de redaktoro. Ankaŭ mi ne sukcesis trankviligi lin, por ke li reviziu sian decidon. Tamen restas la fakto, ke dum 18 jaroj kompetente li redaktis la literaturan rubrikon. Restas lia merito, ke dum tiu longa tempo li donis ŝancon ankaŭ al multaj novaj talentoj konatiĝi per renoma kaj vaste legata revuo. Ni do havas ĉian motivon, kore danki al li kaj funebri pro lia forpaso. Ni perdis amikon de nia revuo, mi perdis – kiel multaj aliaj – bonan personan amikon, kiu profunde impresis ankaŭ pro siaj modesteco kaj humaneco. Sed restas feliĉe por ĉiam la grandioza kultura monumento de lia impona verkaro.

Sincere via

Stefan MAUL

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 27a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopio: +32 3 233 54 33, retroŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hector Alós i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Matil Pentus, Alexander Shlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Joan-Ferriol Masip i Bonet.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.
- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.
- **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net. **Nota:** Librecojn oni ne sendu al la redaktoro proprainicite. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.
- **Medio:** Maritza Gutierrez Gonzalez, Avellaneda 212, e. Gertrudis y Josefina, 10500 Habana, Kubo. Rete: medio@monato.net.
- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.
- **Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, Rua Rio Jutai 320, 82840-420 Curitiba PR, Brazilo. Rete: noveloj@monato.net.
- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.
- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.
- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net
- **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ja 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.
- **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Insulto senintenca

Koncerne la leteron *Insulto al Evonimo* (MONATO 2006/10, p. 8) mi, kompostisto de Monato kaj kulpanto, humile pardonpetas. Mi dubas pri la emo de la redaktora teamo „plibonigi” la originalan tekston de la aŭtoroj. Tamen la grafikisto konstante estas devigata refari plimulton de la grafikaj liveraĵoj. Dum mi refaris la mapon kaj tajpis la nomon de la respubliko, plejcerte mia liberecana subkonscio perfidis min. Ne temas pri mistajpo sed pri mislego, anstataŭ „serenega” mi mislegis „senrega respubliko”.

Eble miaj anarkiismaj idealoj provokis mian mislegan eraron, eble ne. Antaŭ nelonge mi vizitis la serenegan respublikon kaj mi devas agnoski, ke mi sentis min hejme. Preskaŭ ĉio en Evonimo donis al mi la senton troviĝi en mia kara Katalunio. La lifto de la gastejo ne funkciis, trajnoj estis ĉiam malakurataj, la stratoj malpuraj kaj plenplenaj da aŭtoj, kiuj respektadis neniun trafikan normon. La evonimanoj estas ĉarmegaj, ĝentilaj kaj amikaj, kaj ŝajne ili pli respektas la racion ol la leĝon kaj tradicion.

Ĉiuokaze, mi reiros en la serenegan respublikon publike kaj humile pardonpetos. Mi apelacias je ties komprenemo.

Intertempe, estu tiu letero mia plej humila pardonpeto al evonimanoj pri la kvazaŭa kaj senintenca insulto al ilia bela kaj ĉarma lando.

Ferriol MACIP I BONET
Katalunio

Albanio pli demokrata ol Usono

Strangas legi pri kvin ĉinaj ujuĝuroj, akuzitaj pri terorismo (MONATO 2006/7, p. 9), ke la usonaj aŭtoritatoj vane traktis kun 20 ŝtatoj por akirigi al la ujuĝuroj politikan rifuĝejon kaj ke finfine Albanio akceptis ilin. Kial? Antaŭ unu jaro usona juĝejo ja deklaris la ujuĝurojn nekulpaj. Kial ili ne trovis rifuĝejon en Usono mem? Finfine Albanio iĝis pli demokrata ol Usono, la ĉefa garantianto de libero!

Sergej PAĤOMOV
Rusio

Generacia ŝanĝo

La artikolo *Lingvo-politiko: mankas unueco en la Unio* (MONATO 2006/7, p. 7) konfirmas la fakton, ke altrangaj politikistoj en Eŭropo estas forte direktitaj al uzo de la angla lingvo, kaj popoloj, pro plur-

jara agado de la esperantistoj, perceptis la grandan gravecon de neŭtrala Esperanto. Eŭropa Esperanto-Unio pli facile atingos plenan sukceson per modesta enkonduko de Esperanto kiel regula studobjekto en lernejoj de tuta Eŭropo. Poste per generacia ŝanĝo kreiĝos nova stato por la lingvo.

Gavrilo POPOVIĆ kaj
Atanasje MARJANOVIĆ
Serbio

Ĉu liberiga aŭ ne?

Ĉu la Liberiga Armeo en Kosovo (*Protestas Ĉinio*, MONATO 2006/7, p. 9) estas reale liberiga aŭ ne? Antaŭ ĉio oni komprenu la esencon. Unue, ĉu albanoj en Serbio havis aŭ ne havis ĉiujn homajn rajtojn? Due, ĉu ili rajtas krei novan ŝtaton sur teritorio de alia ŝtato laŭ la internaciaj leĝoj? Se oni komprenas la esencon, ja estas klare, ke albanoj en Serbio ja havas ĉiujn homajn rajtojn, kaj ke ili ne havas la rajton deŝiri Kosovon de Serbio. Tiun esencon oni devus klarigi al kosovanoj, kaj tiam oni estus evitinta ambaŭflankajn homajn kaj materialajn perdojn en Serbio, kio estis ankaŭ granda damaĝo por Eŭropo.

Gavrilo POPOVIĆ
kaj Atanasje MARJANOVIĆ
Serbio

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero) ISSN 0299-6587

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

PETU PROVNUMERON ĈE
LA GAZETO – 55210 CREUE (Francio)

gazeto@aol.com <http://www.lagazeto.com>

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaĵoj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Survoje al alia mondo

de Zlatko TIŠLJAR

Kiel la industria revolucio fine de la 18a jarcento centrigis laboron, labormezuradon kaj profiton, tiel ankaŭ la nova informadik-kibernetika revolucio ŝanĝas filozofiojn, celojn, politikon kaj la ekonomian sistemon. Eblas nun observi la tendencojn, kiuj kondukas al tiuj ŝanĝoj.


La informadika erao detruas tabuojn pri la netuŝebleco ekzemple de religioj, nacioj kaj moralaj principoj. Interreto kun pornografio atingas ankaŭ la plej konservativajn sociojn, kaj la plureco de diverstipaj informoj pri ĉiuj temoj ne plu eviteblas. Sociaj sistemoj, kiuj ankoraŭ rezistos al tiu ĉi plurismo, troviĝas en la plej malriĉaj ŝtatoj, kies loĝantoj ofte ne posedas elektron. Sed ankaŭ ili ne longe restos izolitaj.

Materiaj valoroj

Informadiko malebligas la longdaŭran ekziston de simplaj nigra-blankaj ideologioj kaj kondukas al disfalo de dogmoj. Robotiko detruas laborpostenojn, kaj neniu subvencia kaj socia politiko povas venki la rapidan teknikan progreson produktadi sen homaj laborfortoj. La nova socio forigas la bezonon pri laborlokoj, kaj la novaj teĥnologioj detruas la koncepton pri materiaj valoroj kaj pri mono.

Varoj fariĝas ĉiam pli malmultekostaj, kaj servoj – ekzemple interretaj kaj telefonaj – senpagaj. La klasika merkata ekonomio komencas perdi sian ĝisnunan signifon kaj funkcion.

Militoj fariĝas aferoj de fakuloj. Militi per soldatoj, uzantaj simplajn pafilojn, ne plu aktualas. Kiu ne havas fakulojn pri informsystemoj, teĥnologie evoluintajn armilojn kaj soldatojn instruitajn por uzi tiajn armilojn, tiu ne havas ŝancon en milito. La klasika bezono lavi la cerbojn



de la popolo por frenezigi amasojn, kiuj ekmilotos, ne plu validas. Militoj ne plu celas teritoriojn, sed energifontojn, ĉar informadika milito ne okazas sen energio. Pligrandiĝas la risko pri uzo de atomenergiuj armiloj.

Liberalismo kaj profito

La nova spirito detruas la ĝeneralan filozofion pri liberalismo kaj profito. Oni rapide ekkonscias pri medio-damaĝoj, se la baza celo de la ekonomia sistemo restos plu pligrandigi la profiton. La ideoj, ke eble oni ne bezonas klasikan laborlokon, ke laboro konceptita en kapitalismo (dunganto kaj dungato kun fiksitaj laborhoroj) eble ne necesas, fariĝas pli kaj pli diskutataj.

Aperas jam kalkuloj montrantaj, ke riĉaj landoj povus ekzisti, se laborus nur


proksimume 10 % de la loĝantaro. Oni kredas, ke ekzistas minimumo da homoj, kiuj ŝatos labori. Do eblus proklami ŝtaton, en kiu la ŝtatoj simple ne devas havi laborpostenojn kaj laborkvalifikojn, sed ĉiuj devos esti instruitaj, ĉar aliokaze ili ne povos vivi ĉirkaŭite de teĥnologio. Jam en Germanio nur 39 % de la loĝantaro havas laborpostenojn kaj sukcese vivtenas ĉiujn aliajn.

Ĝis nun mono determinis la potencrilatojn. La homa naturo, klopdanta akiri pli da povo, iĝi pli potenca kaj havi pli altan socian pozicion, ĉiam difinas la celon de intersociaj rilatoj. Sed kio povus anstataŭi la funkcion de mono? Ŝajnas, ke tio estos scio. La kvanto de scio difinas la poziciojn de individuoj en la socio. Kiel oni tion mezuros kaj organizos, videblos nur en la estonteco. ■

NIĜERIO

Venkas la verdikto

La posedo de la nafto-riĉa duoninsulo Bakassi (supre) estis pridisputata dum 13 jaroj.



Olusegun Obasanjo, prezidanto de Niĝerio, en Brazilio la 6an de septembro 2005.

Finiĝis 13-jara disputo inter Niĝerio kaj Kameruno pri la nafto-riĉa duoninsulo Bakassi. Niĝerio konsentis transdoni la teritorion al Kameruno, post kiam la lasta el 3000 niĝeriaj soldatoj estas hejmenreveninta.

Jam en 1994 procesis Kameruno kontraŭ Niĝerio ĉe la internacia kortumo en Hago, kiu fine verdiktis favore al Kameruno, sed Niĝerio ne akceptis la decidon por protekti la interesojn de niĝerianoj loĝantaj sur la duoninsulo.

Tamen en junio ĉi-jare, premata i.a. de Unuiĝintaj Nacioj, la niĝeria prezidanto Olusegun Obasanjo akceptis la decidon de la kortumo. Restas al niĝerianoj en la duoninsulo du jaroj por decidi, ĉu translokiĝi al Niĝerio, reteni sian ŝtatanekon kaj ne translokiĝi, aŭ fariĝi civitanoj de Kameruno. Plejparte la niĝerianoj decidis reveni al sia patrujo, kie la registaro disponigos al ili apartan teritorion.

Niĝerianoj ne facile forgesos la aferon, aparte tiuj devigataj pro la interkonsento cedi siajn havaĵojn al Kameruno. Francio jam anoncis sian deziron komenci nafto-esploradon en la duoninsulo. Nuntempe Kameruno importas nafton, dum 90 % de la niĝeriaj ŝtataj enspezoj devenas de nafto.

Princo Henriko OGUINYE/pg

HUNGARIO

Tra infanaj okuloj: memoroj pri la eventoj de '56

IAN PITCHFORD/WIKIPEDIO



Monumento al la viktimoj de la revolucio de 1956 ekster la hungara parlamento, en la supra bildo videblas la flago kun truo kie troviĝis la komunisma simbolo, dekstre videblas detalo de la monumento.

En 2006 oni festas la duonjarcentan jubileon de la t.n. eventoj de '56. La revolucion de la hungaroj kontraŭ la altrudita komunista-sovetia vid- kaj viv-maniero oni nomas en Hungario simple „kvindek ses”. Tamen dum pli ol 30 jaroj la popolleviĝon oni devis nomi oficiale kontraŭrevolucio aŭ, iom neŭtrale, sed kun malaprobiga akcento, „la eventoj de '56”. Ordinaraj homoj ĉiam diris „revolucio” aŭ, mallonge, „kvindek ses”.



IAN PITCHFORD/WIKIPEDIO

En 1956, kiam okazis la revolucio (inter la 23a de oktobro kaj la 4a de novembro), mi estis sepjara infano, kiu vizitadis la duan klason de bazlernejo. Mi estis senkonscia aŭ duonkonscia kunvidanto, kaj iom ankaŭ partoprenanto, de eventoj, kiuj skuis la fundamentojn de la ruĝa diktaturo kaj kontribuis al ĝia posta falo.

La 24an mi iris, kiel kutime, en la lernejon. El radioaparatoj aŭdiĝis informoj, aŭskultataj de nekutime multaj homoj, kvankam oficialajn komunikojn oni ja ĝenerale ne tro fidis kaj atentis. Kelkajn domojn for de nia familia domo, knabo iom pli juna ol mi ekstaris en la kadro de malfermita fenestro kaj kriis al ni, infanoj preterpasantaj: „Eksplo-

dis la revolucio!” Revolucio? Kio estas revolucio? Tiuj vortoj ne multe diris al mi. Sed en la lernejo mi eksciis pli pro tio, ke ne ĉio okazis kiel kutime. Ĉiutage ni devis grupiĝi laŭ klasoj en la korto: tiel nomata pioniro kun ruĝa koltuko ekstaris ĉe la lernejo-pordo kaj tre false ekkantis ian pioniran kanton himnecan. Ni devis kunkanti, kaj dume ▶

En 2006 la legantoj de MONATO donacis 51 senpagajn abonojn al legemuloj en landoj kun malforta ekonomio, nome en Armenio, Benino, Burundo, Ĉilio, Ĉinio, Ganao, Irano, Kongo (D.R.), Kongo (okc.), Kubo, Madagaskaro, Nepalo, Niĝero, Niĝerio, Nikaragvo, Pakistano, Panamo, Rumanio, Serbio, Taĝikio, Tajlando, Tanzanio, Togolando, Tunizio, Ugando, Urugvajo, Uzbekio kaj Vjetnamio. Sed restas ankoraŭ aliaj, kiuj dezirus legi MONATON sed ne kapablas pagi. Helpu al ili kaj subtenu la Abonhelpan Fonduson!



Sendu kiun ajn sumon al FEL aŭ al via kutima peranto, kun la mencio "Abonhelpa Fonduso de MONATO".

Se vi pagas la egalvaloron de unu abono aŭ pli, vi povas ankaŭ ekscii, kiu ricevis la abonon, kiun vi donacis, kaj eble ekkorespondi kun "via" leganto. Skribu tiucele al la eldonejo.

Nome de ĉiuj ricevontoj tre sinceran dankon!

► apud mi oni malrapide hisis ian flagon, mi ne plu memoras, ĉu hungaran aŭ ruĝan. Tiutage la ceremonio ne okazis.

Festa defilo

La instruhoroj komenciĝis malfrue. Kelkaj lernejoj forrestis, kaj la instruistoj kuradis ekscitite en la koridoroj. La direktoro malaperis. Kelkajn tagojn ni devis resti hejme: oni ne sciis, ĝis kiam. Similan konfuzon mi vidis la 1an de majo 1955, kiam kun mia patro mi iris por la festa defilo de la „laboristaro” de la urbo. Mia patro haltis, por babili kun konato, kaj mi pro enuo iom antaŭeniris. Ĉe la angulo de la metiista faklernejo mi ekvidis grandan portretan portotabulon de Mátyás Rákosi [matjaŝ rákoŝi], nia ĉefkomunisto, diagonale prifekitan. La homoj, kaŝe rigardante, preteriradis ĝin, kelkaj terurite, kelkaj kun apenaŭ retenebla rideksplodo.

Oni ne kuraĝis decidi, ĉu voki policanon (kaj eble preni sur sin la torturon de pridemandado kaj eventualan respondecon), lasi ĝin por tutpopola primokado aŭ iel malaperigi ĝin. Tian respondecon neniu kuraĝis (aŭ emis) preni sur sin. Fine hazarde preterpromenantaj policianoj trovis ĝin kaj devis decidi, ĉu forviŝi la ekskrementon de sur la tutpopole adorata vizaĝo (kun la danĝero disŝmiri ĝin tute) aŭ malaperigi ĝin, rekonante tiamaniere la senpovon de la povo. La disvolviĝon mi ne ĉeestis, ĉar mia patro terurite fortrenis min kaj, luktante kontraŭ ridado, malpermesis pluajn demandojn.

Historia ŝtatblazono

Do io ŝvebis en la aero en 1956 kaj iom antaŭe, kion ankaŭ ni, infanoj, iel perceptis. Ni vidis homgrupojn, vigle parolantajn; ankaŭ ŝarĝaŭtojn plenajn de laborvestitaj fabrik-laboristoj, portantaj fojfoje fusilojn kaj entuziasme kantantaj, kun hungara trikoloro fiksita al la kajuto. La ruĝaj flagoj tute malaperis: videblis ĉie la hungaraj. Sur muroj aperis kalke pentritaj surskriboj: „Vivu la hungara patrujo, hejmen ĉiu rusoj!” Kontraŭ forinto eblis aĉeti platan insignon kun la historia ŝtatblazono; kontraŭ du, ankaŭ metalan. Ĉi tiu blazono, kun la duobla apostola kruco

de reĝo Sankta Stefano kaj supre lia krono, estis frue rigore malpermesata.

Sur la insulo Radó, inter la du branĉoj de la rivero Rába, instalas sin sovetia tanko. Du maljunulinoj preteriris el la proksima karmelana preĝejo, kiam aperis stratpurigisto kaj, kiel poste mi eksciis, iama militkaptito en Sovetio, kiu ĵetis ruslingvajn blasfemojn kaj minacis pugne al la soldatoj. Unu el ili senvorte malaperis en la militilo, kaj mi rimarkis nur, ke la kanontubo kaj la mitralo malrapide, sed tre minace direktiĝas al ni kaj sekvas la spiteme plu sakrantan, malrapide forirantan stratpurigiston. Kaj neniam mi vidis tiel kuregi maljunulinojn.

Torturejo

Mia patro, milithardita homo, nur komentis: „La afero ne tiom brulas.” Tamen restis en mi demandoj, al kiuj mi ne ricevis respondojn. Sed nur unufoje mia patro permesis al si fari iaspecan klarigon. Ni haltis antaŭ impona konstruaĵo kun fortikaj kradoj sur ĉiuj fenestroj, kaj li flustre diris al mi, ke tiu estas la sidejo de ÁVH (Ŝtatdefenda Oficejo, fakte torturejo por alipensantoj). Je mia peto pri pliklarigo li donis al mi du sonorajn vangofrapojn.

En strato paralela al la nia loĝis 18-jara knabino. Lun tagon oni hejmenveturigis ŝin bandaĝita sur la dekstra femuro. Laŭdire ŝi grimpis sur la urbodomon por forigi la grandan ruĝan stelon, fiksitan antaŭ la plurjarcenta ŝtona blazono de la urbo. Ŝi jam sukcesis, kiam iu el la najbara konstruaĵo pafis en ŝian femuron. Post ŝia liberiĝo el la prizono mi vidadis ŝin multajn jarojn en profunda deprimado. Oni diris, ke ŝi delonge ne trovas laborlokon. Pri ties kialo mi konsciiĝis nur poste.

Longaj kolonoj

La urbo Győr [djoor], kie mi loĝis, situas en la nordokcidenta parto de Hungario, ĝuste mezvoje inter Vieno kaj Budapeŝto en strategie grava nodo de vojoj, fervojoj kaj riveroj. Tiutempe tiu ĉi regiona centro havis ĉirkaŭ 70 000 loĝantojn kaj multajn fabrikojn. Pro ĝia graveco ĝin rapide invadis sovetiaj trupoj. En la novembraj tagoj post la malvenko de la revolucio longaj

kolonoj de tankoj, kanonoj, kirasveturiloj kaj truportiloj pasis senfine tra la ĉefstrato de la urbo direkte al Vieno. Laŭdire ili returniĝis ekster la urbo, por minace-defie ree traveturi la urbon.

lun novembran tagon, kiam la instruado komencis denove normale funkcii, mi iris kun du kamaradoj al la lernejo. Ni havis tempon, do ni iris al la apuda strato por algapi la militan defiladon. Ja neĉiutaga vidaĵo: knarantaj raŭpveturiloj, long- kaj mallong-tubaj kanonoj, maŝinpafiloj, malfideme ĉirkaŭgvatantaj soldatoj kun pafpretaj mitraloj – cetere la bruo de la longe serpentumanta militmonstro inter la pace afablaj barokaj loĝdomoj kaj la kvin diversreligiaj preĝejoj de la strato Kossuth [koŝut]. Ni aŭdis ion kaj tion pri telermoj ĉe la landlimo kontraŭ la invadantaj sovetiaj trupoj; ni aŭdis krome pri budapeŝtaj junuloj, kiuj ĵetis grenadojn kaj benzinbotelojn kontraŭ la tankojn. Tio donis ideon. Ek do al ago! En la najbara domo loĝis cigana familio, kies infanoj ofte manĝis el ladteleroj kuŝantaj sursojle de la domo. Kaj ni ŝtelis la aluminian trinkujon por kokinoj de mia avino.

Sukcesa ludo

Tiel telermojn ni havis: necesis ilin nur instali (aŭ ĉu ĵeti?). Memevidente ni havis nek praktikon, nek scion, nur svagan imagon. Ni kaŝis nin malantaŭ la angulo de la pastrodomo, kaj en oportuna momento ni ĵetis unu el la teleroj en la mezon de la kolono antaŭ tankon. La ŝtalarŭpaĵo abrupte bremsis, haltis kaj radiofone oni haltigis ankaŭ la tutan kolonon. Nia ĝojo pro la sukcesinta „ludo” estis senlima. La soldatoj sub la klapkovriloj de la tankoj kaj kirasveturiloj tenis pretaj siajn mitralojn. Streĉo pendis en la aero, kaj aŭdiĝis la forta anhelado de la dizelmotoroj.

El tanko elsaltis ulo kun ŝirmkasko, kiu etendis maldikan teleskopan bastonon, singarde proksimiĝis al la „mino”, tuŝis, puŝis, kaj, konvinkiĝinte pri la bluf, kolere ĵetis ĝin for de la vojo. Ni iom atendis, reprenis la teleron kaj ripetis la „militan operacion”. Ĝis la oka horo, la komenco de la instruado, ni almenaŭ kvinfoje haltigis per niaj



Supre: soveta tanko tra la stratoj de Budapeŝto.

Sube: frakasita monumento al Stalino en Budapeŝto.

„minoj” la militmaŝinaron de la Ruĝa Armeo. Pri eblaj sekvoj de la ludo ni konsciiĝis nur poste.

Mallumaj kavernoj

La ludo tamen ne estis nura ludo. Per nia infana instinkto ni perceptis ion majestan, tamen senforman; ni sentis svage, ke homoj kvazaŭ eliras en la sunbrilon post longa vagado en mallumaj kavernoj, ke kvazaŭ post longa premo ili nun libere spiras. La dolĉa amaro de tiuj oktobraj-novembraj tagoj fariĝis por eterne neelŝirebla parto de mia personeco kaj tiu de plurmilianoj da hungaroj.

Post la eventoj ni decidis kun mia pli aĝa frato peti fontoplumon de rusaj soldatoj, kiuj onidire volonte donadis tiajn al infanoj. Ĉe apud-danuba kazerno, post reciproka kuraĝigo, ni salutis la gardostarantan soldaton per laŭta „drastutj” (misprononcita „sa-

luton”), kaj mia frato petis lin per sia magra vortostoko akirita en la lernejo: „Tovariŝ, daj karandás!” („Kamarado, donu krajonon!”). La vorton „fontoplumo” li ne konis. Tiu afable resalutis nin, ion diris al sia kunulo en la pordistejo, kaj oni donis al ni du verdajn krajonojn. Ni iom seniluziĝis, sed ekkomprenis, ke rusoj mem estas afablaj kaj tute ne teruraj homoj.

Jozefo HORVÁTH



ALBANIO

La prokuroro kaj la prezidanto



TARAJUTA, BENZEMBERG

Aviadiloj de la flugkompanio Albatros en la Tirana Internacia Flughaveno: Ĉu daŭre nur ili havos licenson?

La nova demokrata registaro en Albanio, starigita en septembro 2005, deklaris sin preta elradikigi enlandajn korupton kaj krimadon. La rezultoj jam notindas. Sed la socialistoj, kiuj regis dum la lastaj ok jaroj, ne kunlaboras kun la registaro. Ili kaptis la potencon ĉe tiel nomataj sendependaj altaj institucioj, ekzemple la ĝenerala prokurorejo, la konstitucia juĝejo kaj prezidantejo, kun la alta konsilio pri justico.

Laŭ demokratoj, la ĝenerala prokuroro Theodori Sollaku „dormas sur la

kriminalaj dosieroj”. La demokratoj plendas, ke pli ol 700 murdistoj libere cirkulas en la lando, multaj eksaj ŝtato-ficistoj – akuzitaj pri forŝtelo de milionoj da dolaroj – ankoraŭ ne estas juĝitaj, kaj en la altan konsilion pri justico eniras novaj membroj suspektataj pri korupto.

Aldone la prezidanto malofte dekretas leĝojn kontraŭ korupto kaj krimado. Ekzemple la parlamento, regata de demokrata koalicio, aprobis komisionan raporton pri la neceso eksigi la prokuroron, sed la prezidanto hezitas

ĝin akcepti. Siaflanke la opozicio opinias, ke la demokratoj intencas ataki ilin kaj sin venĝi sub la frapfrazo „kontraŭ korupto, kontraŭ krimado”.

Skandalo

Antaŭ nelonge la gazetaro malkovris skandalon rilate la batalon inter demokratoj kaj socialistoj. Temis pri albana flugkompanio *Albatros*, posedata de nepo de la prezidanto, kiu ŝuldas al la ŝtato ĉirkaŭ 800 000 eŭrojn. En decembro 2005 la sekretario de la prezidanto postulis, ke oni ne donu licencojn al la konkuranta albana flugkompanio *Belle Air*, por ke *Albatros* ne havu rivalon.

Tamen en septembro 2006 la direktorejo de civila aviado suspendis la aktivojn de *Albatros*. Intertempe la privata televida kanalo *Top Channel* malkovris telefonan konversacion, en kiu la direktoro de civila aviado diris al la *Albatros*-posedanto, ke, se tiu volas reakiri sian licencon, li persvadu la prezidanton dekreti la eksigon de la ĝenerala prokuroro.

La prokurorejo mem esploras la konversacion. Tamen memorindas, ke en Albanio fortas la mafio, kiu havas multajn ligojn kun politikistoj.

Bardhyl SELIMI

BALKANIO

Alvoko al kunlaboro

Meze de junio 2006 la albana ĉefministro Sali Berisha oficiale vizitis Kosovon. En parolado ĉe la kosova parlamento, Berisha alvokis albanojn kaj serbojn de Kosovo kunlabori por starigi ŝtatajn instituciojn de ilia komuna lando. Krome li vizitis ortodoksajn preĝejojn en Fushe-Kosove (Kosovo-Kampo), kie en 1389 batalis kune albanoj kaj serboj kontraŭ

otomanaj trupoj.

Dum la vizito li anoncis, je la surprizo de la ĉeestantoj, ke „la registaro de Albanio pretas disponigi al damaĝitaj serbaj preĝejoj kaj monaĥejoj en Kosovo grandan monsumon por riparo kaj rekonstruo.” La serboj, dankante la albanan ĉefministron, konsideris tion indiko de interetna amikeco.

Bardhyl SELIMI



MARCA, PRICE

Frua enlitiĝo, frua ellitiĝo

Japanio estas riĉa lando, kie abundas manĝaĵoj, tiel ke oni eĉ forĵetas multajn ankoraŭ manĝeblajn pladojn. Tamen en ĉiuj generacioj troviĝas tiuj, kiuj neniam matenmanĝas. Laŭ statistikoj en 1975 6,3 % de la japanoj ne matenmanĝis; en 2003, 10,1 %.

Precipe pli ol 20 % de la viroj inter 20 kaj 39-jaroj ne matenmanĝas. Ankaŭ, en la jaro 2000, 16 % de la elementlernejanoj kaj 20 % de la mezlernejanoj (12-14-jaruloj) ne matenmanĝis. Laŭ alia enketo inter 2305 patrinoj, 10 % de la unu- ĝis tri-jaruloj ne ĉiutage ricevas matenmanĝon.

Krome konstateblas rilato inter matenmanĝo kaj enlitiĝo: ne matenmanĝis 2,9 % de la beboj, kiuj enlitiĝis antaŭ la 8a horo vespere; 13,8 % de tiuj, kiuj enlitiĝis inter la 10a kaj 11a horoj; kaj 50,0 % de tiuj, kiuj enlitiĝis post noktomezo.

Kampanjo

Rezulte ekde aprilo, la komenco de la japana lernojarlo, la ministro pri edukado kaj scienco komencis kampanjon „Frua enlitiĝo, frua ellitiĝo kaj matenmanĝo”. Ĝis 1997 la ŝtato ne respondecis pri tiaj familiaj aferoj, sed en tiu jaro okazis en urbo Koobe mortigoj de geknaboj fare de knabo: kulpis fuŝa hejma edukado. Pasintjare la registaro publikigis fundamentan leĝon pri manĝedukado, kiu fariĝis bazo de la kampanjo „Frua enlitiĝo, frua ellitiĝo kaj matenmanĝo”.

Matenmanĝi ŝajne rilatas al klereco. Laŭ la Nacia Esploro pri Edukpolitiko, 13-jaruloj kiuj ĉiam matenmanĝas, ricevas pli altajn lerneajn poentojn ol la senmatenmanĝuloj. Prof. Suzuki Masaŝige de la universitato Ŭaseda diras, ke matenmanĝo estas energiofonto bezonata por taga agado: kiuj

matenmanĝas, havas 50 % pli densan glukozon unu horon poste, ol tiuj, kiuj ne manĝas. La profesoro rekomendas, ke oni matenmanĝu kvalite, tagmanĝu simple por ŝtopi energio-mankon, kaj vespermanĝu lukse.

Tri kategorioj

Por matenmanĝo necesas tri kategorioj de manĝaĵo: rizo kaj pano, kiuj donas glukozon; ovo kaj fromaĝo, kiuj konsistas el proteino; kaj vitaminoj kaj mineraloj, kiujn bezonas la cerbo por uzi glukozon. Por vespermanĝo necesas viando kaj fiŝaĵo por fari ostojn kaj muskolojn dum la dormo.

Tamen malgraŭ registaraj kampanjoj malfacile estas matenmanĝigi lernejoj. En socio, kie laboristoj devas sklave labori kaj ofte ne revenas hejmen ĝis malfrue, fojfoje mankas ĉe familioj la kutimo kune manĝi. Familianoj, inkluzive de la junaj, ofte aĉetas manĝaĵojn ĉe tiel nomata oportuna vendejo kaj manĝas solaj.

Kie homoj ne vivas homece, tie mankas homeca manĝo. Manĝaĵo estas ne nur kalorioj por la korpo, sed samtempe nutraĵo al la koro. Ne matenmanĝi indikas krizan familion kaj krizan socion.

HORI Jasuo

20% de la japanaj viroj rezignas pri tia ĉi bongusta matenmanĝo.



IRLANDO

Lingvoj, komunumoj – kaj politiko

Kiel gaelparolanta regiono (*Gaeltacht* [güejltaht]) estas agnoskita en septembro kvartalo en okcidenta Belfasto. Neniu alia nordirlanda instanco krom la ĉefurba magistrato ĝis nun nomumis regionon tia.

La termino *Gaeltacht* estas uzata en la Irlanda Respubliko por regionoj, kie la gaela (irlanda) estas parolata de la plimulto aŭ granda parto de la popolo. Laŭkonstitucie la gaela estas la unua oficiala lingvo de la Respubliko, sed ne de Nord-Irlando.

Sekve membroj de la majoritata Demokrata Uniista Partio de Nord-Irlando protestis kontraŭ gaelparolanta kvartalo en Belfasto. Laŭ ili, iniciatis la projekton Sinn Féin [ŝin fejn], la respublikista partio, kiu celas unuigi la irlandan insulon kaj ĉesigi britan regadon en Nord-Irlando.

Defendantoj de la gaelparolanta regiono atentigis, ke en aliaj urboj

Manifestacio en Gaeltacht (Belfasto).



Politika murpentraĵo en Falls-strato.

troveblas simile agnoskitaj kvartaloj, ekzemple la tiel nomataj „ĉinaj urboj” (angle: *China Town*).

Nesektaj lernejoj

En Nord-Irlando oni neniam povas neglekti politikon. Multaj nordirlandanoj reagis pli politike ol kulture al lingvodemandoj. La politiko decidas interalie pri muziko, danco, sporto, folkloro kaj precipe religio. Tamen videblas signoj, ke tiu ĉi sinteno ŝanĝiĝas, ekzemple en nesektaj lernejoj kaj en universitatoj.

Aliflanke estas raportite lastatempe pri gaelparolanta skota interŝanĝstudento, kiu vizitis Nord-Irlandon. Surpriziĝis la skotino, ke la gaela estas rigardata kiel lingvo parolata nur de katolikoj. Simile, nordirlandanoj miris,

ke nekatolikaj skotoj parolas la skotan varianton de la gaela. En Skotlando la gaela neniam estas rigardata kiel politika aŭ sektisma afero.

Kaj konata estas gaela poeto de nordirlanda deveno, kiu intence verkas ne en la irlandgaela sed en la skota, ĉar li ne volas esti rigardata kiel respublikisto.

Tamen vizitantoj al multaj urboj en Nord-Irlando rimarkos, ke la gaela ofte estas pli aŭdebla kaj videbla (ekzemple en vendejoj kaj negocoj) en oficiale anglalingvaj distriktoj, ol en Dublino kaj aliaj urboj en la Respubliko. Oni povas havi la impreson, ke Belfasto iom post iom iĝas pli irlandlingva ol la suda ĉefurbo.

Garbhan MacAoidh



En Nord-Irlando oni neniam povas neglekti politikon. Politiko regas la tutan socion.



EELCO GRAMER





HUNGARIO

Ŝtormo post ŝtormo

Ŝtorme kritikis la hungara opozicio la kabineton pro nesufiĉa reago okaze de festotaga ŝtormo en Budapeŝto. Mortis kvar homoj kaj vundiĝis sennombraj aliaj, kiam ŝtormo faligis arbojn, flugigis tegolojn kaj renversis boatojn dum la nacia festotago en aŭgusto honore al la landofondinto Stefano La Sankta.

Miliono da homoj surstratiĝis por ĝui spektaklojn, amuzajn programojn kaj tagofine pireteknikaĵojn. Jam ĉesis la rivertrafiko sur Danubo, por ke de sur la apuda monto oni pafu raketojn kaj aliajn artfajraĵojn por ne damaĝi en la riveron.

Post la komenco de la vespera spektaklo neatendite lumigis la ĉielon ne nur raketoj sed ankaŭ fulmoj. Komenciĝis ŝtormego tiel forta, ke baldaŭ ondruliĝis akvo laŭ la stratoj. Ne sufiĉis la nombro de ambulancoj, kaj raportite estas, ke lastfoje dum la revolucio en 1956 plenigis malsanulejojn tiom da vunditoj.

La sekvan tagon Budapeŝto similis al sieĝita urbo. Normala trafiko ne povis funkcii pro falintaj arboj. Ŝajne meteorologo rete informis la respondeculojn, ke minacas ŝtormo, sed la mesaĝo nur malfrue, post la okazaĵoj, estis legita.

Karlo JUHÁSZ



Kontraŭ kosto de 80 000 eŭroj la eksa prezidento de Litovio, Rolandas Paksas, kunpilotis eksperimentan unumotoran aviadilon SM-2000 „Phoenix” (esperante: Fenikso) ĉirkaŭ la mondo. La flugo daŭris 47 tagojn, pli longe ol antaŭvidite, pro malbona vetero kaj aliaj problemoj. Paksas (en la foto maldekstre) kaj lia kunpiloto, la ruso Vladimir Makagonov, veturis entute 55 000 kilometrojn. Tiel ili kompletigis la 123an tian rondiradon de la mondo.

LAST



ĈINIO

Monopolo super la elektropova provizado

La plimulto de la ĉinoj opinias, ke la monopola situacio pri la elektropova provizado estas unu el la strangaj fenomenoj en la ĉina ekonomio. Kvankam en la jaro 2002 la ĉina registaro transformis la monopolon de la Ŝtata Kompanio pri Elektropovo (ŜKEP) al konkurenca grupo kun kvar grandaj kompanioj pri elektropovo kiel la kerno, tamen la transformo ne estigis ajnan pozitivan efikon, kaj la monopolo restas kiel antaŭe.

Jam antaŭ la jaro 2002 ŜKEP, la plej granda produktanto, liveranto kaj administranto de elektropovo en Ĉinio, posedis pli ol 70 % de la 2500 miliardoj da juanoj da kapitalo investita en la tutlanda elektroindustrio. Fakte la kompanio restas monopola magnato, kiu gvidas kaj regas la elektropovan reton de la lando.

Antaŭ nelonge pluraj ŝtataj aŭtoritatoj prezentis al la Ŝtata Konsilantaro sian raporton, kiu montris, ke la sistema reformado de la ĉina elektropova industrio malsukcesis. Tiu

industrio iĝis la ĉefa faktoro, kiu malhelpas la reformadon kaj disvolviĝon de la nacia ekonomio. La raporto klarigas ankaŭ, ke la ĉefaj estroj de ŜKEP, pere de sia monopolo, diversmaniere premas lokajn kompaniojn ekspluatantajn elektropovan reton, por ke ili malrapide kresku kaj ne plu evoluu. ŜKEP celas plifortigi sian monopolan rolon kaj protekti la administracian centralizon. La aŭtoritatoj opinias, ke la radikala kaŭzo, ke dum la lastaj kvar jaroj en Ĉinio la elektropova provizado forte ondiĝadis kaj ofte estis ege nesufiĉa, estas la ŜKEP-monopolo.

Sub la monopolo la kosto de la ĉina elektropovo restas alta. Kvankam en la

tuta lando la prezo de elektro ĝenerale leviĝas, la ĉirkaŭ 2000 miliardoj da juanoj investitaj en la elektropova industrio (kvarono de la tuta kapitalo por la ŝtato) ĉiujare havas profiton de nur 20 miliardoj da juanoj. Tio estas rendimento de apenaŭ 1 %, eĉ malpli alta ol la kredita procento de la ŝtata banko. Kontraste, en evoluintaj landoj la kapitala rendimento ĝenerale povas esti de 9 % ĝis 11 %.

Post kaŝobservado la Ŝtata Fako pri Revizio malkovris, ke en la pasinta jaro la estraro de ŜKEP per malkonvena politiko de livero de elektro kaŭzis grandan perdon de 7,84 miliardoj da juanoj. Krom tio, ankaŭ okazis senkiala ▶

► neniigo de la kapitalo kaj materialoj de la kompanio je 4,5 miliardoj da juanoj. La Ŝtata Fako pri Revizio konstatis, ke en nur unu jaro en la kompanio estis almenaŭ 12 krimaj ekonomiaj faroj, kiuj rilatis al monsumo de unu miliardo da juanoj. Ĝi kalkulis, ke la kompanio en la lastaj kelkaj jaroj havigis al si kontraŭleĝe 21,1 miliardojn da juanoj. Aro da ĉinaj ekonomikistoj taksas, ke ĉiujare la ĉina elektropova sektoro, pro la monopollo super la elektropova provizado, kaŭzas al la ŝtato perdon de rento de 56 ĝis 112 miliardoj da juanoj.

En la printempo de la jaro 2007 Ĉinio okazigos tutlandan popolan kongreson por diskuti pri ŝtataj aferoj. Cirkulas informo, ke dum la kongreso la reprezentantoj diskutos proponon pri la tiel nomata *Leĝo kontraŭ monopollo* kaj fine ĝin agnoskos, por ke la ŝtato ne plu pro la elektropova monopollo suferu, kaj por ke la publiko ne plu provoku per plendoj la ministrejon pri elektropovo.

Mu Binghua

Grandaj investoj en la elektropova industrio havigas nur malgrandan profiton al Ĉinio.

ĈINIO

Pezaj enlandaj ŝarĝoj por la registaro

Laŭ la bulteno de la ĉina centra banko, en 2006 la kvanto de devizo-rezervoj de Ĉinio superis 800 miliardojn da usonaj dolaroj kaj estas la plej alta iam. Tamen tio ne povas fari Ĉinion riĉa lando. Ĝi eĉ ne apartenas al la meze riĉaj landoj.

Ĉinio restas disvolviĝanta lando kaj bezonas gravajn investadojn por levi la estontan vivnivelon de pli ol miliardo da civitanoj. Enlande la elspezoŝarĝo de la ĉina registaro estas sufiĉa peza. Antaŭ nelonge gra-

va inform-esplora organizaĵo en Pekino faris opinienketon, por informiĝi, kiel peza estos tiu ŝarĝo dum 2006-2010. Sube estas la ĉefaj rezultoj de la enketo.

Mildigi sekvojn de restrukturado

Unue, la ĉinoj plejparte sentas maltrankviliĝon pro la malbona situacio de la ĉina banksistemo. La vera sumo de malbonaj kreditoj ne estas konata, sed oni ĝenerale opinias, ke la ŝtato certe ne permesos al enlanda banko bankroti. Sekve la ĉina registaro nepre apartigu fonduson de po kelkdek miliardoj da ĉinaj juanoj jare por eventuala monhelpo okaze de urĝo aŭ krizo.

Due, la ĉina registaro devas elspezi diversajn subvenciojn promesitajn de la ŝtato. Ekzemple, la registaro lastatempe asignis monsumon al iu ŝtata entrepreno, kiu pro la plialtiĝo de la monda petrolprezo havis gravan deficiton. La entrepreno akiris la deficiton, ĉar ĝi devis vendi multekoste aĉetitan petrolon je kompare malalta prezo fiksitita de la ŝtato.

Cetere, la ŝtato devas ankaŭ pagi subvenciojn al kelkaj milionoj da ofiĉistoj kaj laboristoj, kiuj antaŭe laboris en ŝtata entrepreno, sed nun estas maldungitaj pro la ekonomia reformado. Milionoj kaj milionoj da malriĉaj agrokulturantoj, kies agron la ŝtato ial



RICHARD CHAMBERS



Dimanĉa bazaro en Kaŝgaro, ujgura aŭtonoma regiono: Ĉinio estas eĉ ne meze riĉa lando

konfiskis, forte postulas de la registaro kompenson.

Eviti estontajn problemojn

Krom tiuj menciitaj pagoj, Ĉinio nepre disponigu grandegajn monsumojn al instruado, publika higieno, publika trafiko, publika sekureco, media regulado, konstruado de bazaj oportunaĵoj, nacia defendo kaj aliaj sektoroj.

Ekzemple, Ĉinio disponigas senpagan naŭjaran instruadon al la plej junaj lernantoj kaj pro tio grandkvante asignas monon al lernejoj mezaj kaj bazaj, por ke ili aĉetu instruajn ekipaĵojn kaj por ke instruistoj havu stabilan monatsalajron.

Ankaŭ estas ĉiujare ĉ. kvin milionoj da gejunuloj kiuj diplomitiĝas el superaj lernejoj kaj serĉas enoficigan ŝancon. Sed tro malmultaj laborpostenoj ofte ne povas kontentigi la plejmulton de la gejunuloj. Por ne kaŭzi socian fluktuaĉdon, la registaro ĉiam malavare donas al senlaboraj gejunuloj monhelpon, por

ke ili havu minimuman viv-garantion.

En la enketa raporto troviĝas ankaŭ emfaza diskutado pri la problemoj de media protekto kaj publika higieno, ĉar ambaŭ interrilatas.

Ekde 2000 en Ĉinio estas serioze polucitaj multaj urboj, ĉefe pro mineralaj brulaĵoj. Ĉinio akiras siajn necesajn energifontojn, kiel elektron kaj varmon, ĉefe pere de siaj abundaj mineralaj riĉaĵoj. Kvankam la malaltaj normoj de eliĝo-regado kaj de petrolprodukta kvalito eble reduktas la rektan produktokoston, tamen la polucioj kaŭzataj de malmodera uzado de malbonkvalitaj brulaĵoj sendube kaŭzas problemon de publika sano. Ĉinio estas devigata pli multe elspezi por kurackostoj, mediregulado kaj aliaj.

Ĉar pro la malbonaj vivkondiĉoj fakte la plimulto de la ordinaraj ĉinoj troviĝas sur la lima punkto inter sano kaj malsano, Ĉinio alfrontas kaj alfrontos tre altan pagon por la publika higieno. Nun neniu el la plej altaj instancoj kapablas antaŭkalkuli, kiom granda estos tiu kosto dum 2006-2010. Kiam en

2005 en Ĉinio okazis la „birda gripo”, la registaro por tio elspezis pli ol dek miliardojn da ĉinaj juanoj. Tutcerte, la pago por publika higieno estos grandega, ne nur dum 2006-2010, sed ankaŭ dum tre longa posta periodo.

Ankaŭ la problemoj pri profesia sano estas konsiderinda. Kiel konate, la reala forto de la industria ekonomio en Ĉinio estas starigita surbaze de la povo produkti eksportajn varojn. Alivorte, ĝi tute dependas de tio, ke laboristoj nepre senĉese praktikas sian produktadon. Tiuj inkludas la tutan laboristaron ĉe produktadaj linioj, la ministrojn, kiuj ekspluatas karbojn, kaj la laboristojn en la fabrikanta industrio. Preskaŭ ĉiuj tiuj ĉi laborspecoj facile kondukas siajn profesiulojn al profesiaj malsanoj. Nun en Ĉinio estas almenaŭ dek milionoj da suferantoj de profesiaj malsanoj kaj la nombro multiĝas kun rapideco de ĉirkaŭ miliono da homoj ĉiujare. Laŭ la ĉina leĝo pri labora protekto, iliaj kurackostoj devas esti pagataj de la ŝtato.

Mu Binghua

LITOVIO

Salajro en koverto

Dum la pasinta vintro en Litovio ege famiĝis jena historio. Dalia Budrevičienė, dungitino de agrofirmao el Krekenava, kies akciojn posedas i.a. la estro de la tiam reganta Laborista Partio, Viktor Uspaskiņ, publike deklaris, ke parton de sia salajro ĉiuj dungitoj ricevadas neoficiale, laŭ litova esprimo „en kovertoj”. Baldaŭ

post tia publika konfeso la virino estis maldungita.

La historio en Litovio provokis grandan reagon. Aktiviĝis prokuroroj kaj diversaj organizaĵoj ekis al defendo de la kuraĝa virino, kvankam tia situacio por neniu estis surprizo. Ŝi senvaligis nur la pinton de la nigra ekonomio. Spertuloj asertas, ke en la tuta

lando ĉirkaŭ 20 % de la salajroj estas pagataj „en kovertoj”. Kutime tiel oni pagas al dungitoj, kiuj oficiale ricevas nur minimuman salajron.

Jonas Guzevičius, vicprezidanto de la litova industriista konfederacio, klarigis, ke la metodo estas tre favora por entreprenoj, pro tri kialoj: unue, dungitoj ne protestas kontraŭ tia pagmaniero; due, dungantoj evitantaj impostpagon sentas sin nepunindaj kaj trie, la impostoj en Litovio estas tiel grandaj, ke oni preferas riski entute eviti impostpagon.

Antaŭ nelonge la ŝtata imposta inspekto ĉe ministrejo pri financoj oficiale esprimis ĝojon pri la kreskanta konscienco de la dungitoj kaj informis, ke ekde nun ĉiuj loĝantoj povos informi pri enkovertaj salajroj je telefonnumero 1882. La oficistoj promesis konfidon kaj anonimecon de la telefoninto. La ricevitajn informojn pritraktos specialaj laborgrupoj.

LAST

D. R. KONGO

Kongaj bankoj ekhavas malbonan reputacion

En 2004 preskaŭ 500 000 usonaj dolaroj (USD) malaperis el la monkelo de *Banque Centrale du Congo (BCC)*, la centra banko de la Demokratia Respubliko Kongo. En la sama jaro, post interna kontrolo, evidentiĝis, ke ĉe *Banque Commerciale du Congo (BCDC)* mankis 4,5 milionoj da USD.

Western Union estas internacia organizaĵo pri ĝirado de mono. En landoj sen bone funkcia banka sistemo ĝi estas la sola ebleco por fidele sendi monon de unu loko al alia. En Kongo ĝi kunlaboras kun BCDC. En multaj kongaj urboj la agentejoj de BCDC ricevas

monon kaj plenumas pagordonon por Western Union. Kiam aperis bruoj pri neregulaĵoj, BCDC fermis la giĉetojn de Western Union kaj lanĉis enketon. La enketo montris, ke per komplikaj procedoj dungitoj de la banko malaperigis 4,5 milionojn da USD.

Ĉe la BCC la 14an de oktobro

2004 oni konstatis, ke monĉambro, en kiu devis esti diversaj valutoj kun egalvaloro de preskaŭ 500 000 USD, estis malplena. La pordo de la ĉambro estis blokita, kaj, trarompinte ĝian muron – laboro, kiu postulis plurajn tagojn – oni konstatis, ke en ĝi estis nenio. Kvar dungitoj, respondeculoj pri tiu monĉambro, estis maldungitaj kaj transdonitaj al la tribunalo. Laŭ krimspecialistoj ili solaj ne povis fari tion kaj devas esti retoj kaj protektantoj.

Depost kelka tempo la faskoj de monbiletoj el la centra banko estis neplenaj: fojfoje ses ĝis dek biletoj mankis en ĉiu ligaĵo de dudek kvin biletoj. Tamen la banko havas kontrolilojn. La ŝtatoficistoj pagitaj tra la centra banko ĝemas pro tiu nesufiĉo, ĉar iliaj salajroj jam ne permesas al ili bone vivi. Ankaŭ iuj faskoj enhavas multajn monbiletojn ŝiritajn aŭ gluitajn kun malsamaj numeroj. Nur la transportistoj kaj la petrolŝipoj facile akceptas tiajn biletojn. Feliĉe, la valoro de la konga franko nun estas stabila.

Serge-Benjamin ZANDANDU

Prezidanto de la japana centra banko profitis

Malkaŝiĝis, ke Fukui Toŝihiko, prezidanto de Japana Banko, profitis 14,73 milionojn da enoj (105 214 eŭrojn), investinte en Fonduso Murakami. Pri tio multaj japanoj koleras kaj postulas lian ekŝiĝon.



Fukui Toŝihiko, prezidanto de la Japana Banko

Japana Banko estas la centra banko de Japanio, kiu traktas ĉion pri la japana valuto kaj decidas pri la interezonivelo de privataj bankoj. Ĝiaj movoj influas la prezojn de akcioj. La prezidanto de Japana Banko povas scii kaj fari ĉion pri la japana ekonomio. Ĉu estas permesite al li gajni monon per investado en profitcela fonduso influata de la politiko de Japana Banko?

Petite en la parlamento, Fukui prezentis sian proprieton. Li investis 10 milionojn da enoj en 1999, kiam li estis prezidanto de privata kompanio Fujicuu-sooken, kaj post sep jaroj li profitis 14,73 milionojn da enoj. Pri tiu sumo li diris: „Tiu profito ne estas tiel granda”. Ĉi-rilate menciindas, ke li enkondukis en la japanan ekonomion la politikon de nulo-interezo, pro kio ordinaraĵoj preskaŭ ne povas ricevi interezon de siaj ŝparaĵoj. Dume li profitis multe sen laboro, kaj eĉ diras, ke tiu sumo estas malgranda.

Li ankaŭ investis 10 milionojn da enoj en Fonduso Murakami. Murakami estis burokrato de la ministrejo pri financoj, kiu en 2000 ekŝiĝis kaj komencis agadi en la ekonomia mondo kun kapitalo de 4 miliardoj da enoj, kun la helpo de Mijauĉi, prezidanto de kompanio Orix. Post la debuto de Murakami aperis en la akcia mondo fenomeno, ke kiam Murakami investis al iu kompanio, ties akciprezco altiĝis. Ricevinte la informon pri kurzaltiĝo, Murakami senprokraste vendis tiujn

akciojn kaj gajnis multege da mono.

Tamen ĉio havas sian finon. En junio 2006 li estis arestita pro sia kontraŭleĝa aĉeto kaj vendo de akcioj. Fukui investis en lia fonduso kaj asertis ke tio estis perfekte ĝusta. Tamen, en la konsilantaj raportoj de la Murakami-Fonduso estis lia nomo. Li do funkciis kiel reklamanto de Murakami, nuna krimulo. Tiam Fukui ne estis prezidanto de Japana Banko, sed la eksa vic-prezidanto kaj probabla estonta prezidanto. Li helpis al Murakami gajni monon kaj samtempe ankaŭ li gajnis monon danke al Murakami.

Ĉefministro Koizumi en 2003 nomumis Fukui kiel prezidanton de Japana Banko, sed li kaj lia kabineto estas indiferentaj pri lia mongajno kaj volas silentigi la kritikon per revizio de la interna regularo pri la estraranoj de

Japana Banko en Tokio



Japana Banko. Ankaŭ Fukui ne havas intencon ekŝiĝi.

Laŭ enketo de la ĵurnalo Mainiĉi, 67 % de la enketitoj opinias, ke Fukui ekŝiĝu, tamen tiu opinio tute ne speguliĝas en la politiko de la registaro. Estas jena saĝa frazo el Ĉinio „ne rearanĝu ĉapelon sub la persikarbo”. Tio signifas „evitu dubindan agon”, ĉar kiam iu rearanĝas sian ĉapelon sub la persikarbo, oni emas dubi tiun pri ŝtelado de persiko supre pendanta. La prezidanto de Japana Banko plukis grandan persikon. Li kaj la ĉefministro insistas, ke tio ne estas kontraŭleĝa, sed tio estis tiel dubinda ago, ke multaj homoj perdis fidon al Japana Banko.

HORI JASUO

AŬSTRIO

Laŭ spuroj de „La Tria Viro”



La muzeo pri „La Tria Viro” en Pressgasse 25.

Oni ofte pensas pri Vieno lige kun la verkaro de komponistoj Haydn, Mozart, Beethoven, Schubert kaj familio Strauss. Multaj turistoj vizitas la aŭstran ĉefurbon pro ĝiaj muziko kaj teatroj, muzeoj kaj parkoj. Krome ankaŭ viglaj filmamantoj povas veturi al Vieno por ekkoni la lokojn, kiujn reĝisoro Carol Reed uzis por la filmo „The Third Man” (La tria

viro, 1949) – vera majstroverko kaj plej granda filmo iam ajn produktita de brita kompanio. La scenaron de la filmo verkis Graham Greene.

Post la dua mondmilito Vieno estas konkerita de la nigra merkato. Komence de la filmo oni aŭdas la ektimegan citro-muzikon de Anton Karas, kiu rapide gvidas la spektantojn en la mondon de malico, mensogoj kaj mur-

Tiun panoramon vidis Harry Lime kiam li renkontis sian malnovan amikon Holly Martins en tiu ĉi giganta rado.



BILDERN SMIESTAD



Harry Lime kaŝe eniras tie ĉi la kloakojn de Vieno, por viziti la sovetian kaj internacian sektorojn.

do. Sed la filmo estas ankaŭ gaja kaj sprita, populara, sed ankaŭ profunda esploro de la morala elekto.

Neniam antaŭe aŭ poste oni tiel realisme pentris Vienon en filmo. Unu el la plej vidindaj lokoj tie estas *Riesenrad*, la famkonata giganta rado, kiu troviĝas en Prater-parko. Ankaŭ nun el ties supro oni povas ĝui panoraman vidaĵon de la dumiljara urbo. Harry Lime (aktoro Orson Welles), protagonisto en *La tria viro*, invitas al Vieno sian malnovan amikon Holly Martins (Joseph Cotton). Ilia sola reala renkonto en la filmo okazas sur tiu giganta rado.

Alia grava loko en la filmo estas la monumento omaĝe al imperiestro Jozefo la Dua sur la samnoma placo. „Barono” Kurtz, rumano Popescu kaj la mistera Tria Viro portis la korpon de Harry preter la statuo de imperiestro. Harry havas apartamenton en la proksima palaco *Pallavicini*, konstruita en 18a jarcento. Du gigantaj kariatidoj ankaŭ nun staras ambaŭflanke de la pordo de Pallavicini. Tie oni povas vidi ankaŭ la fenestron de la palaco, tra kiu la pordisto – sola atestanto de la „akcidento” – promesas komuniki la informon al Holly. Sed oni mortigis la pordiston antaŭ ol li povas plenumi tion.

Komence de la filmo oni vidas parton de *Zentralfriedhof* (centra tombejo), kiun oni povas atingi per longa tramveturo ekde la urbocentro de Vieno. *Zentralfriedhof* havas tri milionojn da tomboj, inkluzive tiujn de multaj famaj komponistoj. Post la dua mondmilito ĝi situis en la internacia sektoro (1945–1955), kiun dum la filmlaboroj



administris soldatoj el Sovetio, Usono, Britio kaj Francio.

La aŭtoritatoj permesas la fosadon de speciala tombo en la centra tombejo por la „funebra” ceremonio de la „mortinta” Harry Lime. Tie Holly Martins vidas kiel liaj amikoj Kurtz kaj d-ro Winkel ĵetas teron en la tombon. Tie ĉeestas ankaŭ Anna Schmidt, la amorantino de Harry. Ankaŭ policistoj, kiuj esploris la krimojn de Lime kaj lia bando, observas la ceremonion. Poste en la filmo Holly vidas pruvon pri la krimoj de sia malnova amiko, vizitinte malsanulejon kaj vidinte la suferadon de infanoj je meningito, kiujn oni povis kuraci per penicilino. Kaj Lime ŝtelis, diluis kaj vendis tiun kuracilon, ricevante grandan profiton.

Ankaŭ kloakaj kanaloj de Vieno, kiuj longas entute 500 km, vizitindas, ĉar ili estas grava loko en la filmo. Ili estas preskaŭ la sola parto de Vieno, kiu ne estis difektita dum la milito kaj estis ideala loko por sekretaj vojaĝoj. Lime plu vivas (estas alia membro de la bando, kiu kuŝas en la ĉerko komence de la filmo) kaj uzas la kloakojn por frekventi la sovetian kaj internacian sektorojn. Ĝuste en la kloaka kanalo Martins mortpafas Lime fine de la filmo.

Estas muzeo pri la filmo en Pressgasse 25 en Vieno. Tie oni povas vidi grandan kvanton da afiŝoj en multaj lingvoj, per kiuj oni reklamis ĝin.

W. H. SIMCOCK

Kronikoj de niaj frustriĝoj



„Popolo, kiu ne kuraĝas ridi pri si mem, ne estas matura.” (Raymond Schwartz)

Memkritiko, same kiel sinmalkado, ofte rezultas el klara memkonscio. Stultaj estas do socioj aŭ homgrupoj, kiuj prenas sin mem tro serioze kaj, blindigitaj de siaj veroj, ne povas vidi sin en la spegulo de la konscio. Ni, heroaj kaj samtempe klaŭnecaj donkiĥotoj de Esperantujo, estus povraj estaĵoj, se ni, de tempo al tempo, ne igus nin objekto de nia propra rido.

Aliflanke, obstina malkapablo ridi pri si mem kreas paradokson: ĝi vekas ridemon. Nu, kial ni tiel ofte priridas la Civiton, eĉ se tiu ridado estas kamufлита per la eleganto de niaj retorikaĵoj?

Ĉi tie temas tamen pri alispeca mokado, grava atingo, pri kiu ni povas pli fiere fanfaroni ol pri la multnombraj sablokasteloj, kiujn ni, esperantistoj, ŝatas konstrui. *Samideanoj*, kolekto de „satiroj kaj humuraĵoj pri Esperanto kaj esperantistoj”, kompilitaj de Aleksander Korĵenkov, Sten Johansson kaj Valentin Melnikov, kondukas nin al ridado, ridetoj, fojfoje melankoliaj ridoj, ĉar finfine ĝi memorigas nin pri nia hejmo.

Ridante de teksto al teksto (datitaj de 1914 ĝis 2005), la leganto pasos tra diverskolora galerio de verkistoj, el kiuj estas okazaj kaj „plentempaj” humoristoj: Vasilij Devjatnin, Julio Baghy, Trevor Steele, E. Wende, Raymond Schwartz, Liven Dek. Jen nur kelkaj el 21 aŭtoroj, kiuj konsistigas la kolekton. Ili plejparte karikature bildigas la fuŝaĵojn de esperantistoj kaj/aŭ de ilia verda mondeto.

Escepto estas Gonçalo Neves, kiu iras iom kontraŭdirekte en *Fakistoj*: en scienca kongreso, la partoprenantaj sciencistoj – pentritaj de la aŭtoro kiel homoj, kiuj pli kaj pli multe specialistiĝas pri pli kaj pli malmulto – estas bise kaj fajfe aklamitaj, kvazaŭ film-steluloj. Tiu situacio pluas ĝis alpaŝas la podion, la lasta ĉe la lastaj, iu „etkreska barbulo okulvitra” por prezenti al la publiko deksex-regulan helplingvon. La sekvo estas antaŭvidebla, eĉ se mankas al la leganto iom da imagpovo: la publiko lin forpuŝas per „eksplosa malaplaŭdo”, ĉar al ĝi plaĉas nur „amplekse kompleksaj” eltrovaĵoj. Simplas la ideo, sed la rakonto estas teksita tiel (kun evidentaj markoj de la poeta talento), ke la leganto ne sukcesos deteni sin de ridado.

Tutsame, kiel ne priridi la fervoran aŭskultanton de kurt-ondaj – kaj tro kurt-daŭraj kaj maloftaj – esperantaj radioprogramoj? Pie li atendas la horon de la elsendoj por fine nur kelkajn disajn frazojn aŭskulti, pro oftaj fadoj kaj malhelpo de familianoj, televidantaj en la sama ĉambro. Lia plezuro tre mallonge daŭras, ĉar el triminuta radioprogramo li povas kapti nur kelkajn sekundojn da vortoj, ne povante aŭskulti la finan recepton por la sukceso de Esperanto, donitan de intervjuato. Oni povas nur imagi, ke la rolulo, en tiu rakonto de Roger Imbert, titolita *La noktoj de Sam Ideano*, samideane atendos „ĉiun kvinan semajnon en la monato” por vane provi aŭskulti siajn ŝatatajn elsendojn.

Pro tiaj trafaj bildigoj, la leganto eble identiĝos kun kelkaj roluloj kaj tiel kun ili solidariĝos.

La demando pri la eternaj versfaristaĉoj kaj pri malbonaj verkistoj kaj kanzonistoj de Esperantujo estas pritraktita en rakontoj de pluraj aŭtoroj, entute 5 (Vasilij Devjatnin, Czesław Kozłowski, Sten Johansson, Trevor Steele kaj Christian Rivière). Ĉu „popolo diras, Dio diras”? En tiu okazo, bedaŭrinde, jes.

Ne mankas satiro de Louis Beaucaire, kiu per sia *Kiel mi fariĝis kunfondinto de UEA* (oni legu „Unuiĝo de Esperantistaj Amordomoj”) aldonas malprudan spicaĵon al la kolekto. Ĝi kontrastas, ekzemple, kun la klasika *Gastamo* de Spomenka Štítec, ne nepre pro foresto en ĉi-lasta de pikaj eventoj, sed pro diferenco de rakonttekniko. Pro forta motiviĝo en la eventoĉenoj (kaj eble ankaŭ pro aludoj al veraj okazintaĵoj en la Esperanto-movado), la rakonto de Beaucaire impresas pli flua ol tiu de Štítec. La leganto tamen ambaŭokaze ridos.

Granda merito de tiaspecaj verkoj konsistas en tio, ke ĝi proponas nenian solvon al nia problemaro. Ĝi plejparte legeblas kiel amuzaj kronikoj de niaj frustriĝoj, sed, legante ĝin, ni almenaŭ ricevas la impreson, ke ni iom ferias el niaj „celadoj”, kiel dirus Zamenhof. Do, anstataŭ kolekti suspirojn (de tio ni jam havas larĝan stokon), kiel prova rolulo en la lasta rakonto (*Kolektanto*), el la plumo de Liven Dek, ni tutsimple kolektas ridojn. Eble – kiu scias? – intertempe aperos senmanka recepto por la „antaŭenigo de nia afero”.

Reinaldo Marcelo FERREIRA

21 aŭtoroj: *Samideanoj: satiroj kaj humuraĵoj pri Esperanto kaj pri esperantistoj*. Eld. Sezonoj, Kaliningrado, 2006. 80 paĝoj, glue binita. Sen ISBN.

Prezo ĉe FEL: 7,50 eŭroj + afranko

Memoroj neniam perdasian malĝojon

Kelkaj personoj spertas relative feliĉan infanaĝon. Aliaj spertas koŝmaran infanaĝon kaj plej ofte neniam sukcesas forgesi la teruron de tiu periodo. Kelkafoje, la koŝmareco de eventoj persistas dum la tuta vivo kaj plagas ĝis preskaŭsuicido. Homoj tiel suferantaj reagis diversmaniere. Multaj el la ĉefaj artistoj de la historio penis liberigi sin, almenaŭ iomete, per pentrado aŭ skulptado, tiel konkretigante siajn emociajn sentojn. Granda nombro de la plej gravaj verkistoj de la historio tiel agis. Pensu nur pri Graham Greene, kies suicidemo devigis lin ludi „rusan ruleton” ĉiujare je certa dato. (Oni prenas revolveron, en kiun oni ŝargis unusolan kuglon; oni ruligas la cilindron, metas la buŝon de la revolvero al sia kapo, kaj pafas. Aŭ nenio rezultas, aŭ oni mortas.)

Nia aŭtoro, Armela LeQuint, en antaŭnoto, atentigas: „Mi dankas al Stefan Maul, kiu senvole donis al mi impulson skribi kaj, tiel, liberigi min de kelkaj premaj infantravivaĵoj”.

La unua duono de la libro efektive pentras scenaron el relative feliĉa frua infanaĝo. Kvankam (senintence) naskita, en 1940 en Francio, al patro kiu estis panbakisto, kaj al patrino kiu fuŝpenis abortigi ŝin, ŝiaj unuaj jaroj estis tolereblaj; ŝi loĝis kun diversaj parencoj: geavoj, diversaj gepraonkloj kc., kelkafoje kun sia patro. La patrino malaperis el ŝia vivo kelkajn tagojn post la nasko, kaj reaperis nur jarojn poste, dum la infera parto de la infanaĝo de nia verkinto.


Kiom feliĉaj estis tiuj unuaj ses jaroj? Nu, evidente ili ne estis tro katastrofaj, kvankam ni certe povas dubi pri la sento de stabileco, al kiu la infano rajtis, sed al kiu ĝi mankis. Kion ni ja povas konkludi el la rakontoj, estas, ke la infano akiris nenian fidon al la estonteco, kaj ne povis antaŭkalkuli

pri tio, kio okazos post monato aŭ eĉ semajno. Ŝi ŝajnis tre lerta kaj inteligenta infano, kvankam ne ĉiam tre sukcesa en la lernejo. Ŝian edukiĝon oni ne tre fervore kontrolis. Tamen, plenkreskinta, ŝi montras sin kaj talenta kaj inteligentoplena.

Kiu ses- aŭ sep-jara infano ne kelkafoje pisas en la lito, dumdorme? Kiu ses aŭ sep-jara infano, konstante relokata al nova domo kaj novaj prizorgantoj, ne regule pisas dumdorme en la lito? Kiom el tiuj infanoj oni premias pro tio per vangobatoj? „Mi vidis nur kandelojn pro la violentaj vangofrapoj ricevitaj.” Multfoje.

Nelonge post tio, al jam ankoraŭ nova domo, en kvartalo plena de gangsteremaj loĝantoj, ebruloj, policanoj. Unufoje, komisiite aĉeti florbrasikon, ŝi perdis la moneron, donitan al ŝi tiucele. Reveninte hejmen, la vicpatrino venĝis sin. „... ĉu vi povas imagi la furiozon, kiu kaptis mian anstataŭpatrinon? Ŝi bategis min, sango fluis de mia nazo...” Intermite ŝi estis savita el tiu hejmetoso per nelonga loĝado kun iu afabla parenco; tamen abruptaj vizitoj fare de ŝia patrino ne ĉiam plifeliĉigis la situacion.

Nu, la infanaĝo ne daŭras eterne, kvankam povas sentiĝi tiel al la koncerna infano. Kio okazis en la post-adoleska periodo, la aŭtoro firme



refuzas diskuti. Do ni povas nur imagi. Ĉiukaze, malgraŭ ĉiaj tragedioj (kaj ĉu, espereble, kelkaj maltragedioj postinfanaĝaj?) de sia vivo, ŝi en sia sesdekkvina jaro kuraĝas prezenti al la mondo la historion de tiuj infanjaroj, kaj tiurilate mi nur povas laŭdi ŝin.

La libro estas bone presita. Kaj la lingvouzo de la aŭtoro, jam konata pro sia traduklaboro pri diversaj gravaj verkoj, estas neriproĉebla. Se vi ne deziras konsciigi pri la veroj de la vivo, do nepre ne legu ĉi tiun libron. Sed se vi volas malkaŝe konfronti la realon de la vivo, la libro estas rekomendenda. Eble ĉar profesie mi devas kuraci tiajn viktimojn de la ĉiutaga nigra flanko de la vivo, mi konsilas, ke vi ne strutumu, sed legu kaj pripensu.

Donald BROADRIBB

Armela LeQuint: *Infantravivaĵoj: aŭtobiografia rakonto*. Eld. la aŭtoro, 2005 (2a eldono). 36 paĝoj, vinktitaj. ISBN ne indikita.

Prezo ĉe FEL: 4,91 eŭroj + afranko

La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL,




Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.
Tif. + 32 3 234 34 00;
tlk. + 32 3 233 54 33;
rete: retbutiko@retbutiko.net;
skajpe fel-monato
aŭ per www.retbutiko.net.

3 en 1

Ĉiuj vortoj ekzistas el 3 apartaj vortoj aŭ radikoj. Post la solvado, en la 4a kolumno aperos nombro. Bonvolu sendu ĝin cifere antaŭ la 15a de decembro al nia redakcio: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, aŭ rete al enigmoj@monato.net. Inter la gajnintoj Monato lotumus 3 personojn, kiuj ricevos abonon al la revuo Enigmo, por eĉ pli da streĉa enigma plezuro!

- 1 adjektivo + sama adjektivo + taŭga R = senceremonian vestaĵon
- 2 postuli R + gutoj de vaporo R + angla biero = spicaĵo
- 3 distingilo R + malvira + mola hararo R = fikcian
- 4 vasta etendaĵo de sala akvo R + mustelspecia besto R + daŭro = konfitaĵo
- 5 longa metala stango R + instigi + homo = kredanto
- 6 adverbo + granda mevo R + scii R = sepkoloran kurbliunion
- 7 adverbo + prepozicio + prefikso = irigis malproksimen
- 8 lina teksaĵo R + parte + materia kvanto R = inklinas al permesado
- 9 ujo R + kanapo R + frakcio = muzikilo
- 10 prepozicio + aspiro R + membro = blanka argilo
- 11 hejma besto + faco R + ekstremoparto de nazo = episkopa preĝejo
- 12 narkota substanco R + poseda adjektivo + korpoparto R = vantano
- 13 transformi en ledono R + adverbo + pagilo R = procentan partoprenon en profito
- 14 ŝipoparto R + giganto R + korinklino = pezo
- 15 prefikso + sidi sur ovoĵo R + gento R = revelacias
- 16 reala R + remparo R + amfibio R = rilatan al kupra oksido
- 17 interpunkcia signo R + minaĵo R + objekto = varo
- 18 prefikso + rapide moviĝi R + aervibrado R = esploran promenadon
- 19 rombforma marfiŝo R + eŭropano R + pezo de ĉia entenantaĵo R = kavalkado R
- 20 enmara roko R + preni ion kiel rimedon + prepozicio = rezignis



Solvo de la marta enigmo

Multege da ĝustaj respondoj, nome 179, 436 kaj 623, venis precipe rete. Estis pene por elekti 3 gajnintojn! La libron *Sudokoj* ricevos Sonia Amariglio (Francio), Didier Izacard (Germanio) kaj Don Rogers (Nov-Zelando). Gratulojn al ĉiuj, kiuj solvis kaj al la tri gajnintoj!



ANONCETOJ

...**jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj personoj 25-55-jaraĝaj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provekzemplo. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fö u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Ĉu vi scias, kio estas Esperanto-sudoko? Esperanto-sudoko estas sudoko-enigmo, en kiu oni ne serĉu 9 ciferojn, sed 9 literojn, nome la literojn el la vorto „Esperanto"! „Sudokoj", enigma libreto kun 80 diversaj enigmoj, kun ciferoj je 4 niveloj, sed ankaŭ kun literoj kaj eĉ spegulbildaj, nun aperis okaze de la 10-jara ekzisto de la Retbutiko. Ĝi signifas por vi horojn da enigmo-plezuro! Prezo: 3 eŭroj + afranko ĉe ĉiuj bonaj libroservoj kaj ĉe www.retbutiko.net.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Facilaj donacoj por viaj korespond-amikoj: la donacokuponoj de FEL. Ekzistas librokuponoj en kiu ajn sumo, kiun oni povas interŝanĝi en la Retbutiko de FEL (www.retbutiko.net), kaj donacokuponoj por trimonata, sesmonata aŭ jara abono al Monato. Por mendoj aŭ informoj: FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

27 EUR
30 USD
aŭ egalvaloro

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarketo
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

REGULAJ KUNLABORANTOJ: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
ikk@free.fr

Komencanto

"Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj. Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998
Formato A4, 16 paĝoj

retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo:
www.komencanto.narod.ru

Poŝta adreso:
KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg,
620041 Rusio

Abontarifo: 15 eŭroj
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.
Abonu ĉe UEA aŭ
ĉe via landa peranto

La jaro 2007

Via poŝtamiko dum la tuta jaro 2007 (kaj pli)



Poŝkalendaro

- kun spaco por fari notojn,
- kun indiko de la festotagoj en diversaj landoj

Enciklopedieto

- kun la ŝtatoj de l' mondo,
- kun ĉefurboj, loĝantoj, surfaco ktp ktp,
- kun indiko kiel telefoni el kaj al eksterlando
- kun radioprogramoj en Esperanto
- kaj multe pli

Mendu ĝin tuj

ĉe Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140,
B-2000, Antwerpen, Belgio
retbutiko@fel.esperanto.be
aŭ ĉe via Monato-peranto
(vidu liston kaj prezojn en p. 4).

Certiĝu pri ĝustatempa livero, kaj mendu jam nun por la 3 venontaj jaroj (5 % da rabato) aŭ por la 5 venontaj jaroj (10 % da rabato!).